



## I F E F - Internacia Fervoja Esperanto-Federacio

---

### Fakaj novaĵoj (lasta : 2013-mar-16)

(la plej freŝaj novaĵoj supre)

---

---

*(mesaĝo de Jindřich Tomášek 2013-03-14)*

El fervoja mondo 4 (jaro 2013)

En la dosiero, kun fotoj, legeblas pri...

**Aŭstrio** : Weinviertel – regiono de provincaj fervojoj

**Ĉeĥio** : Interesiĝo pri porklientaj servoj de Ĉeĥaj Fervojoj kreskas

**Germanio** : Subtenaĵo por modernigi bremsojn en agordo kun EU

**Hungario** : En publika proponkonkurso por motorvagonkombinaĵoj restis nur Stadler

**Pollando** : Metrotrajnoj Inspiro el Vieno al Varsovio veturas sur reloj

**Taĝikio** : Fervoja trafikisto aĉetas novajn pasaĝervagonojn

**Turkio** : General Electric fabrikas lokomotivojn por Turkio

**Usono** : Vartransporto sur fervojo kreskas

(preparis Jindřich Tomášek, reviziis Heinz Hoffmann)

---

---

*(el mesaĝo de Leopoldo 2013-02-07)*

**Subakva trajno en Venecio, ĉu ŝerco ?**



"el Vizağlibro"

---

*(el mesağo de Leopoldo 2013-02-07)*

### **Lokomotivo Nohav**



*Mi estas per la fama lokomotivo.... :) (Ĝi estas la granda NOHAB)*

"el Vizağlibro"

---

*(mesaĝo de Jindřich Tomášek 2013-02-06)*

[Rerigardo al foiro InnoTrans 2012](#) (kun fotoj, 1,1 Mo).

Jen la komenco de la dosiero :

Tradicia loko por renkonto de fakuloj por fervojaj veturiloj, infrastrukturo kaj informoj sistemoj fariĝis internacia foiro de trafika tekniko InnoTrans en Berlino. En la tagoj 18-an ĝis 21-an de septembro 2012 ĝi okazis jam naŭan fojon, kaj partoprenis ĝin ĉirkaŭ 2450 ekspoziciantoj el 47 landoj de la tuta mondo. Partopreno de vizitantoj estis ankaŭ rekorda, venis pli ol 110 mil, kio estas plejmulto en historio de la foiro.

InnoTrans per sia signifo povas esti komparata verŝajne nur kun foiro Transport Logistic en Munkeno.

Kaj en Berlino estis multaj allogaĵoj por vidi : De lokomotivoj kaj tramoj, pasaĝer- kaj varĝvagonoj ĝis labormekanismoj, aŭ reloj kaj trakforkoj.

(la sekvo, kun fotoj, legeblas en la dosiero (1,1 Mo))

---

*(mesaĝo de Jindřich Tomášek 2013-02-06)*

[El fervoja mondo 2](#) (jaro 2013)

En la dosiero, kun fotoj, legeblas pri...

**Ĉinio** : Ekspluat-apertigo de plia grandrapida linio

**Ĉeĥio** : En veturilriparejo en Olomouc estas riparataj boĝioj Görlitz

**Germanio** : Hibrida motorvagono ŝparas elektran energion

**Hungario** : Sekureca sistemo ETCS en Traxx veturiloj

**Hungario** : Motorvagonkombinaĵo Bzmot ricevis retrolakadon

**Pollando** : Trakokunligo al flughavenoj plivastiĝas

**Rusio** : Aĉeton de lokomotivoj subskribis prezidento mem

**Serbio** : Lokomotivoj Traxx trafikos ankaŭ en Serbio

**Slovakio** : En malprofitaj trajnoj IC plimultiĝas pasaĝeroj

**Sud-Afriko** : Miliarda mendo por aglomerzonaj trajnoj

**Svisio** : Pro festotagoj estis plimultigita transportkapacito

(preparis Jindřich Tomášek, reviziis Heinz Hoffmann)

[El fervoja mondo 1](#) (jaro 2013)

En la dosiero, kun fotoj, legeblas pri...

**Bulgario** : Privatigo de BDŽ Cargo haltigita

**Ĉeĥio** : Novaj modernigitaj pasaĝervagonoj en ekspluatado

**Francio** : Tramo-trajnoj el Liono trafikos ĉiun duonhoron

**Francio** : Trafikistoj postulas kompenson pro strikoj

**Germanio** : Modernigitaj vagonoj por trajnoj IC en ekspluatado

**Hispanio** : Kien iros investoj en jaro 2013

**Japanio** : Trajnoj Super Komachi havis premieron

**Kazaĥio** : Unua lokomotivo el miliardkosta serio prezentita

**Pollando** : Pli rapidaj kunligoj apud Szczecin kaj Olsztyn

**Rusio** : Kiu gajnis en vendo de Freight One

**Svisio** : SBB Cargo kunmetos kombinitan reton

(preparis Jindřich Tomášek, reviziis Heinz Hoffmann)

---

*(el mesaĝo de Leopoldo 2013-02-01)*

## Trajno en Usono



"el Vizaĝlibro"

---

*(el mesaĝo de Leopoldo 2013-01-28)*

## Trasiberia fervojo



Trajna vojaĝo tra Rusio laŭ fama, plej longa en tutmondo fervojo — 9298 km

(4,607 mejla). Dum la vojaĝo vi sukcesos viziti Moskvon aŭ St.Petersburgon kaj konatiĝi kun vivo de popoloj de Rusio en provincaj urboj, paŝi el Eŭropo en Azio tra limo de la kontinentoj, gustumi tradician rusan manĝon kaj ĝui kuirarton de aliuj nacioj de Rusio, ekskuesi laŭ bordo kaj ondoj de la Bajkalo — la plej granda lago en tutmondo. Post la trajna veturado vi povas veni Vladivistokon, urbon ĉe pacifika bordo de Rusio kaj forflugi aŭ ŝipveturi al najbaraj landoj, aŭ turni vin en Mongolio aŭ Ĉinio laŭvoje post Bajkalo.

Fonto : <http://vojagxo.info/itinerroj.html>

kaj pli precize : <http://vojagxo.info/itinerroj/trasiberio/skizoj-pri-trasiberia-fervojo.html>

---

*(el mesaĝo de Leopoldo 2013-01-21)*

## **Stacio Herzberg**



*(el mesaĝo de Leopoldo 2013-01-19)*

## **Vartrajno en Norvegio**



Fonto : Facebook

---

*(el mesaĝo de Leopoldo 2013-01-19)*

## **Ĉinio : Fervojo transportos 3,1 miliardojn da pasaĝeroj dum ferioj**

Redaktoro: Yu Rongkang

La 17an de januaro en Pekino proparolanto de la ĉina ministerio de trafiko kaj transportado He Jianzhong diris, ke dum ferioj de la Printempa Festo de 2013 la fervoja sektoro transportos 3,1 miliardojn da pasaĝeroj. Tio estas ke, ĉiutage la fervoja sektoro transportos 77,41 milionojn da pasaĝeroj, pli multe je preskaŭ 9% ol en la sama periodo de la lasta jaro.

Fonto : <http://esperanto.cri.cn/581/2013/01/18/179s145185.htm>

---

*(mesaĝo de Jindřich Tomášek 2013-01-11)*

[El fervoja mondo 10.doc](#) (jaro 2012)

En la dosiero, kun foto, legeblas pri...

**Aŭstrio** : Nacia rekordo en rapido kreskis al 336,4 km/h

**Ĉeĥio** : Lasta Regionova forlasis Šumperk

**Francio** : Ministro prezentis opiniojn pri estonto de fervoja sektoro

**Germanio** : Germanaj Fervojoj prezentis veturilkombinaĵon ICx

**Germanio** : Helpvagonaroj por trafiko en tuneloj

**Laoso** : Trafikkunligo kun Ĉinio denove havas ŝancon

**Litovio** : Deka CityElefant por Litovaj Fervojoj

**Montenegro** : Ĉeĥaj firmaoj rekonstruis fervojlinion

**Pollando** : PKP InterCity aĉetos novajn pasaĝervagonojn

**Slovakio** : Elektokonkurso por parto de la koridoro finis

(preparis Jindřich Tomášek, reviziis Heinz Hoffmann)

---

*(mesaĝo de Jindřich Tomášek 2013-01-09)*

[El fervoja mondo 9.doc](#) (jaro 2012)

En la dosiero, kun fotoj, legeblas pri...

**Aŭstrio** : Trajnoj Railjet transportos ek 2013 ankaŭ biciklojn

**Ĉeĥio** : Tuneloj apud Olbramovice rektigis 4-an koridoron

**Ĉinio** : Estas menditaj pliaj motorvagonkombinaĵoj por ekspluatado

**Germanio** : Sekurecinstalaĵo por koridoro

**Hungario** : Elektokonkurso por radikala rekonstruo de stacio Vác

**Hungario** : Novaj lokomotivoj por Hungario portas nomon TRAXX

**Italio** : Por esti ekologia kaj konkurenckapabla

**Japanio** : Prezenta veturilo por grandrapido

**Svisio** : Plia serio de trajnoj Pendolino por linio tra tunelo Gotthard

(preparis Jindřich Tomášek, reviziis Heinz Hoffmann)

---

*(el mesaĝo de Leopoldo 2013-01-07)*

(Israelo) La trajnoj funkcas inter la 3 ĉefaj urboj : Hajfo, Telavivo, Jerusalemo.

<http://www.youtube.com/watch?v=cdogg0qcaTw> (daŭro 2 min 36)

---

*(el mesaĝo de Leopoldo 2013-01-07)*

### **(Aŭstrio) Ĉefstacidomo por ĉefurbo**

Ekde decembro 2012 Vieno havas novan ĉefan stacidomon. Funkcias jam kvin trakoj ; ekde 2014 funkcios 12.

Jam nun trajna pasaĝero ĝuas avantaĝojn. Tiu ne plu devas alveturi la iaman sudan stacidomon, iri kelkcent metrojn kaj atendi en la apuda orienta stacidomo. Eblas nun trajnŝanĝi ĉe la sama kajo aŭ eĉ simple rekte traveturi post mallonga halto.

Walter KLAG

Fonto : [artikolo](#) de Walter Klag el [Monato](#).

---

*(el mesaĝo de Leopoldo 2013-01-03)*

## Ĉinio elektrizis sian sekcion de la nova Eŭrazia Kontinenta Ponto

Redaktoro: Yu Rongkang

La 31an de decembro 2012 ekfunkciis la elektrizita fervojo inter Lanzhoi, ĉefurbo de Gansu-provinco, kaj Urumĉio, ĉefurbo de Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono. Tio signifas, ke estas komplete elektrizita la ĉina sekcio longa 4 100 kilometrojn de la nova Eŭrazia Kontinenta Ponto. En la jaro 1978 Ĉinio elektrizis la fervojon inter Baoji kaj Tianshui, kaj poste ĝi komencis transformi la restantajn sekciojn.

Fonto : <http://esperanto.cri.cn/581/2013/01/02/179s144512.htm>

---

*(mesaĝo de Jindřich Tomášek 2012-12-31)*

[El fervoja mondo 8.doc](#) (jaro 2012)

En la dosiero, kun fotoj, legeblas pri...

**Aŭstrio** : El Graz al Salzburg kaj Innsbruck pli kvalite

**Ĉeĥio** : Ŝaktrajno denove traveturis mezan Eŭropon

**Germanio** : Federaciaj landoj deziras pli efikan reguligon de DB

**Germanio** : Nombro de pasaĝeroj kreskis

**Eŭropa Unio** : Postulataj pli altaj rajtoj de vojaĝantoj pri informoj trafikaj

**Kolombio** : Vartrafika linio reekspluatata, eĉ plilongigota

**Nederlando** : Marhaveno Roterdamo ricevis plej rapidan kontrolsistemon

**Svisio** : Novaj laviloj ŝparos akvon

**Svisio** : Ŝtato subtenas fervojojn finance

(preparis Jindřich Tomášek, reviziis Heinz Hoffmann)

---

*(el mesaĝo de Leopoldo 2012-12-30)*

## Malfermiĝis kvar novaj metrooj en Pekino

La 30an de decembro jam malfermiĝis kvar novaj metrooj en Pekino. Ĝis nun la suma distanco de la metrooj en Pekino atingis 443 kilometrojn, kaj sekve Pekino fariĝis la urbo, kiu havas plej longan distancon de la metrooj funkciantaj en la lando.

Xiong Linping

Fonto : <http://esperanto.cri.cn/581/2012/12/30/177s144411.htm>

---

*(el mesaĝo de Leopoldo 2012-12-28)*



## **Ekfunkciis la Ĉina-Kazaĥa Fervojo 2012-12-27**

Tagmeze de la 22-a de decembro la ĉina trajno n-ro 2001 kaj la kazaĥa n-ro 3602 respektive trapasis la relo-interligitejon de la Ĉina-Kazaĥa Fervojo. Tio markis, ke ekfunkciis la fervojo inter Horgos de Ĉinio kaj A Tengke de Kazaĥio kune antaŭenpuŝita de la dulandaj ŝtatestroj. Ĝi estas la dua internacia fervojo de Ĉinio al Meza Azio, Okcidenta Azio kaj Eŭropo.

La fervojo longas je 585 kilometroj inkluzive de 292 kilometroj en Ĉinio kaj 293 kilometroj en Kazaĥio. La funkcio de la fervojo faras Horgos de Xinjiang internacia trafika centro kun aŭtovoja, fervoja kaj tuba transporto al Meza Azio kaj eĉ al Eŭropo.

Laŭ plano la jara transporta kvanto de varoj de la fervojo atingos 15 milionojn da tunoj en la unua periodo kaj 30 milionojn da tunoj en la estonteco.

Redaktoroj : Zhao Xi kaj Niu Xueqin

Fonto : (kun foto) [http://www.espero.com.cn/se/txt/2012-12/27/content\\_509266.htm](http://www.espero.com.cn/se/txt/2012-12/27/content_509266.htm)

---

*(mesaĝo de Jindřich Tomášek 2012-12-24)*

[El fervoja mondo 7.doc](#) (jaro 2012)

En la dosiero legeblas pri...

**Aŭstrio** : Signifaj okazaĵoj sur Aŭstraj Fervojoj

**Belgio** : Funkciadprovo por vartrafiko en Eŭrotunelo

**Bolivio** : Urbojn La Paz kaj El Alto kunligos la plej granda transportilo perkabla

**Britio** : Naŭmetra miniatura fervojo helpas al gejunuloj

**Ĉeĥio** : Dekstraflanka trafiko sur Norda Fervojo de la Imperiestro Ferdinando

**Germanio** : Tra Katzenberg-tunelo jam okazas trafiko

**Korea Respubliko** : Grandrapida trajno por rapido ĝis 430 km/h

**Pollando** : Al flughaveno Chopin en Varsovio trafikos ankaŭ trajnoj.

**Rusio** : Lastoĉka jam provetrafikas por Olimpiko

**Svisio** : Kantono Schaffhausen kun novaj haltejoj

(preparis Jindřich Tomášek, reviziis Heinz Hoffmann)

---

*(mesaĝo de Jindřich Tomášek 2012-12-13)*

[El fervoja mondo 6.doc](#) (jaro 2012)

En la dosiero, kun foto, legeblas pri...

**Aŭstrio** : Rail Cargo Aŭstria akuzis eksped-entreprenon Gartner  
**Brazilo** : Kompanio CPTM en SÃO PAULO mendis dizellokomotivojn  
**Ĉeĥio** : Eksprestrajnoj D1 Express konkurencas al ŝosea trafiko  
**Germanio** : Pramŝipa transporto el Germanio al Rusio startis  
**Hungario** : GYSEV elektrizos 137 km sur du linioj  
**Italio** : Tunelo sub Bologna liberigos liniojn sur tersurfaco  
**Pollando** : Aĉeto de novaj veturiloj por enlandaj linioj  
**Slovakio** : Tatry Card servos ankaŭ kiel retbileto  
**Svedio** : Scandinavian Motortransport revenis al GreenCargo  
**Svisio** : SBB anstataŭigos mil aŭtomatojn biletvendajn  
**Turkio** : Grandrapida fervojlinio konstruota  
(preparis Jindřich Tomíšek, reviziis Heinz Hoffmann)

---

[En la sama rubriko](#)

[El Fervoja Mondo 2014/01](#)

[El Fervoja Mondo 2014/02](#)

[El Fervoja Mondo 2014/03](#)

[El Fervoja Mondo 2014/04](#)

[El fervoja mondo 2014/05](#)

[El fervoja mondo 2014/06](#)

[El fervoja mondo 2014/07](#)

[El fervoja mondo 2014/08](#)

[El fervoja mondo 2014/09](#)

[El fervoja mondo 2014/10](#)

[El fervoja mondo 2014/11](#)

[El fervoja mondo 2014/12](#)

[El fervoja mondo 2014/13](#)

[El fervoja mondo 2014/14](#)

[El fervoja mondo 2015/1](#)

[El fervoja mondo 2015/2](#)

[El fervoja mondo 2015/3](#)